



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

ESPERANTO  
EN  
PERSPEKTIVO

prezo 86,80 GM

Mendu ĉe Libro-  
servo Pickel

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (0911) 463649; 514269

N-ro 15/1975 - 22 aprilo 1975  
Aperas ĉiusemajne

### Salutvortoj por la 53a Germana Esperanto-Kongreso

Dr. Rudolf Eberle, Ministro por ekonomio, meza klaso kaj trafiko de la lando Baden-Württemberg:

Okaze de 53a Germana Esperanto-Kongreso mi kore bonvenigas ĉiujn partoprenantojn en la ferilando Baden-Württemberg. Pro la decido por Oberkirch kiel kongresloko vi konatiĝos kun la beleco kaj diverseco de la pejzaĝo de Nigra Arbaro, kun la distingiga kuirmaniero en Baden kaj - por ne forgesi - kun la alta kvalito de la vino en Ortenau. Eble la programo de via kongreso krome lasos al vi tempon por viziti la ĉirkaŭaĵon de tiu pentrinda malgranda urbo; ĉirkaŭaĵo al kiu apartenas mondfamaj sanigaj fontoj kaj kuraĉlokoj same kiel trankvilaj kamparaj ripozejoj. Pro la najbareco de Francujo kaj Svislando ĉe ni en Nigra Arbaro konkrete proksima estas la internacieco, al kiu sin aparte devoligis via movado. Plia kaŭzo por vi reveni.

Al via kongreso en Oberkirch kaj antaŭ ĉio al viaj klopodoj pere de Esperanto kaj la turismo atingi pliprofundigon de la amikaj rilatoj inter la popoloj, mi deziras bonan sukceson.

\*\*\*\*\*

Erwin Braun, urbestro kaj anstataŭanto de la distriktestro en la parlamento de Ortenau-distrikto:

1962 en nia urbo okazis la 40a Germana Esperanto-Kongreso. Ni ĉiuj ĉi tie en Oberkirch estis fieraj, ke tiutempe Oberkirch estis elektita kiel kunvenloko, ĉar jam ĝis tiam al la laboro de niaj Oberkirch-aj esperantistoj ni ĉiam dediĉis grandan intereson.

Post propono de nia urbkonsilantara kolego Walter Poppeck, estro de la Esperanto-Grupo Oberkirch, dum la 40a Germana Esperanto-Kongreso en la jaro 1962 ni povis doni al grava strato en nia urbo la nomon "Esperantostrato". Volonte mi memoras, kiun grandan entuziasmon tiu decido de la urbo Oberkirch tiutempe elvokis ĉe la kongrespartoprenintoj.

Nun okazos en Oberkirch ankaŭ la 53a Germana Esperanto-Kongreso. Ni dankas pro tio, kaj ni esprimas la esperon, ke denove la kongresanoj sin bone sentos ĉe ni. La premisojn por tio ni volonte kreos.

La lingvo "Esperanto" por mi havas mondvastan signifon kaj tial mi deziras, ke ĉio, kio estos perlaborita dum tiu kongreso, pli-rapidigu la atingon de la aspiritaj grandaj celoj.

Nome de la urba konsilantaro kaj la loĝantaro de Oberkirch ankoraŭfoje koran saluton al la kongrespartoprenantoj kaj bonan, memorigan restadon en Oberkirch, la urbo de la vino en la regiono Ortenau.

\*\*\*\*\*

Vizitu la librostandon de Libroservo Ludwig Pickel kadre de la "Tago de la malfermita pordo" en Augsburg, dimanĉe la 27an de aprilo 1975, de 11a ĝis la 16a horo, en Augustaner Haus, Annahof 4!

El la kongresa programo en Oberkirch

Oberkirch (pp) La malfermo de la 53a Germana Esperanto-Kongreso, pentekoste en Oberkirch, okazos sabate, la 17an de majo. El la programo ni mencias:

Sabate, 17.5.75 20 horo: Balo

Dimanĉe, 18.5.75:

9,00 horo Ekumena diservo

Celebras pastro Roger Degrelle, Nancy, kaj pastoro Wilhelm Grillenberger, Fürth/B.

20,00 horo Kultura vespero

- a) Folkloro orkestro muzikas
- b) D-ro W. Perrenoud, Svislando, prezentas: "Turismo kaj kulturo"
- c) 10jara Ĝemeliĝa jubileo: Esperanto-grupoj Gray/Francujo kaj Oberkirch
- d) Esperanto-teatraĵo "Proksima Nekonato" (vidu p. 4!)



Lunde, la 19a de majo, okazos du duontagaj ekskursoj, kaj marde, la 20a de majo, la kongresanoj havos okazon partopreni tuttagan ekskurson tra Nigra Arbaro kaj Svaba Juraso.

\*\*\*\*\*

Esperanto-kursoj per Robbimat-2 en Primošten

Paderborn.(pp) La Eŭropa Klubo (prezidanto Hermann Behrmann, Paderborn) intencas aranĝi Esperanto-feriokursojn en Primošten, Jugoslavio, de la 3a ĝis la 30a de aŭgusto. La specialaĵo en tiuj kursoj estas, ke duono de la instruado okazos pere de la plej nova instru-aŭtomato Robbimat-2 de la esplorcentro Paderborn, FRG; la alia duono estos plenumita en tradicia formo. La kursoj funkcios antaŭtagmeze. La partopreno dum 1 semajno kostas 30 GM.

Aliĝojn sendu al Eŭropa Klubo, D-479 Paderborn, Riemekestr. 62

Ĥodiaj diskutoj kun partioj

Paderborn (pp) La Esperanto-junularo Paderborn, FRG, invitis laŭvice la tri ŝtatoportantajn partiojn, la liberaldemokratojn, la socialdemokratojn kaj la kristdemokratojn, al podia diskutado pri la estonta eŭropa kultur- kaj lingvopolitiko. Oni povas aserti, ke la Esperanto-junularo utiligis la tre favoran okazon por tiaj aranĝoj, ĉar estas balotkampanjoj nuntempe, kaj la partioj volonte akceptas tiajn invitojn. La diskutojn lerte gvidis la prezidanto de la Esperanto-junularo Paderborn, Karl Trimborn.

\*\*\*\*\*

"Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft"

unu el la sciencaj revuoj, kiuj entenas planlingvan resumaron!

Subtenu la novan iniciaton! Abonu la revuon!

Abonotizo 29,60 GM por 4 numeroj

Mendu ĉe Schrödel-Verlag, D-3 Hannover-Döhren,  
Postfach 260620

\*\*\*\*\*

## Esperanto en Radio (pp)

Dum la pasinta semajno ni havis bonŝancon. Ni povis aŝukulti ĉi-tie en Nürnberg al preskaŭ ĉiuj stacioj, kun pli aŭ malpli kontentiga rezulto. Radio Romo estis bone aŭdebla sur 41 m, Vieno tamen estis iomote ĝenita de perturboj; sed tre klare estis aŭdeblaj Fekino kaj Sofio. Berno kaj Varsovio ja ĉiam estas bone aŭdeblaj.

### Nova kadra programo el Varsovio

Radio Varsovio nun dissendas sian novan kadran programon por la periodo Majo - Novembro 1975.

La plej grava ŝanĝo en la kadra programo estas, ke nun la plej ŝatata programero "Esperanto-Ekspreso" estas ĉiusemajne aŭdebla trifoje, nome: Dimanĉe, je la 16,30 horo kaj je la 22,30 horo kaj lunde, je la 6a horo.

Letu la novan kadran programon de: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O.Box 46, PE-00-950 Varsovio 1, Pollando.

### Radio Budapeŝto ne elsendos Esperante

Laŭ Kuriero de Esperanto de Radio Roma la Budapeŝta Radio respondis al letero, en kiu oni petis la reenkondukon de Esperanto, jene: "Kiel vi vidas, vi povas trankvile skribi ankaŭ en la itala, ni kapablos respondi. Bedaŭrinde, ni ne havas elsendojn en Esperanto, kaj dumtempe eziŝtistas nenia ebleco ilin iniciati dum baldaŭa estonto. Ni bedaŭras, sed ni povas sendi la horplanon de niaj elsendoj en fremdaj lingvoj sen tiu en Esperanto. Bonvolu nin aŝskulti en la itala."

Iomote de Esperanto-redakcio de Radio Roma: "El la pristudo de la menciita horplano de Budapeŝta Radio, klare montriĝis la kaŭzo de ĉi tiu ĝentila sed neta rifuzo elsendi en Esperanto: la hungara radio, ja dissendas en nur limigita kvanto da lingvoj, inter kiuj troviĝas ĝuste la itala, dum ne estas tie uzataj pluraj gravaj lingvoj, inter kiuj, ekzemple la rusa kaj ĉiuj aliaj slavaj lingvoj."

### Rezolucio favore al Esperanto

Romo. En sia lastdimanĉa Kuriero de Esperanto Radio Roma sciigis:

Sekve de prelego-debato okazinta en Romo la 9an de aprilo, laŭ iniciato de la Provinca Federacio de Romo de la itala socialdemokrata partio (P.S.D.I.) kaj kun interveno de la partia vicsekretario, deputito Franco Nicolazzi, kiu estas la subskribinto de la konata leĝpropono por enkonduko de Esperanto en la italajn lernejojn, la asembleo aprobis detalan kaj varman rezolucion favore al Esperanto kiel rimedo por unuigi ĉe la bazo la tutmondajn popolamasojn. La asembleo ankaŭ subtenis la iniciaton de PSDI ĉe la Socialisma Internacio, esprimis la deziron, ke oni konkrete esploru la eblecojn de Esperanto en la Sindikata kampo, kaj aplaudis al la ideo organizi en Romo, dum venontjara septembro, la unuan kongreson de la socialistoj esperantistaj.

### "Insulo de la feliĉo"

Vieno. El unu el la pasintaj semajnaj komentarioj de d-ro Alfred Macher de Radio Vieno ni citas: "Precipe pro neniel antaŭvidebla stabila evoluo de ĝia ekonomio, la papo iam nomis Aŝstrion "insulo de la feliĉo". Sed ĉar ĝuste insulo dependas de la ĉirkaŭa mondo, pro la neceso de daŭraj eksportado kaj importado, la mondvasta krizo tuŝas nun ankaŭ nin."

\*\*\*\*\*

^  
Cu vi jam skribis vian poŝtkarton aŭ leteron de la monato aprilo? Se ne, faru tuj!

T e a t r o                      k a j                      L i t e r a t u r o

La Internacia Rondo (I R) "Amikoj de la Esperanta literaturo kaj kulturo", Libroservo Ludwig Pickel, Nürnberg, invitis la polajn geaktorojn, Kalina Pieńkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynsky, Varsovio, al kvarsemajna turneo tra Federacia Respubliko Germanio por prezenti la

Esperanto-teatraĵon "PROKSIMA NEKONATO"

de Aleksander Scibor-Rylski en la Esperanto-traduko de Jerzy Grum

Kune kun la teatra prezentado en Esperanto Libroservo Pickel aranĝos libro-ekspozicion.

Ĉi tiu teatra kaj literatura Esperanto-turneo tra nia lando estos bona okazo por informi en plej eble multaj lokoj pri Esperanto ĝenerale, kaj pri Esperanto-kulturo speciale.

La organizanto utiligos ĉiujn eblojn de informado: gazetaran servon, la lokajn gazetojn, radion kaj eventuale televidon kaj personajn kontaktojn.

La turneo okazos de la 16a de majo ĝis la 15a de junio 1975.

La unua prezentado kaj ekspozicio okazos en Oberkirch kadre de la 53a Germana Esperanto-Kongreso, dimanĉe la 18an de majo, je la 20a horo, en la kongresejo.

Ĉiu germana esperantisto povas kunhelpi por sukcesigi tiun unikan okazon pri la vivanteco de Esperanto.

Libroservo Ludwig Pickel alvokas speciale la lokajn grupojn kaj rondojn inviti la teatran teamon kaj organizi teatran vesperon.

La teatraĵo daŭras ĉ. 1 1/2 horojn. Oni povas prezenti ĝin en granda salono, sed ankaŭ en malgranda ĉambro, antaŭ 100 ĉeestantoj aŭ nur antaŭ 5 personoj. Do, oni povas prezenti ĝin kadre de normala grupa vespero.

Pro detaloj kaj financaj kondiĉoj bv. kontakti Libroservon Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

Kiu ne povas inviti, tiu povas kontribui al la sukcesigo per mondonaco. Post la turneo ĉiu donacinto ricevos raporton.

Baldaŭ eliros vojaĝplano, en kiuj urboj okazos prezentadoj kaj ekspozicioj. Ĉiuj individuaj esperantistoj jam nun estas invititaj viziti la prezentadon en tiu urbo, kiu estas por li plej konvena!

Sed speciale mi invitas al la prezentado kaj ekspozicio en Oberkirch dum la Germana Esperanto-Kongreso! Aliĝu tuj al la kongreso!

Ni denove aldonas aliĝilon! Sed aliĝi vi povas kompreneble en la lasta momento! Do venu al Oberkirch!

Informojn donas:

Ludwig Pickel, Libroservo  
85 Nürnberg 1, Postfach 2113  
Postscheckkonto Nürnberg 819 56-851  
Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579

